



ESPERANTE

Gazeto de la laborista Esperantista Grupo " Antaŭen " Sekcio Bourne .

Sekretario :
J. Bonte

Redaktoro :
R. Fontjn

Nº 1
Septembro 1949a

Estimataj Gekamaradoj,

Kun multe da plezuro ni prezentas al vi la plej novan produktaĵon de nia laboro - tian gazeton de nia grupo. Malgraŭ la fakto ke la eldono de gazeto postulas grandajn kostojn, ni opinias tiun eldonon sufiĉe utila.

Ja, ĉar multe da membroj forrestas la kunvenojn kaj pro tio sciigas kalkulon anstataŭ nenion plu pri la laborado en la grupo grupgazeto estas vokata por sciigi pri ĉi tiu tempo al tempo rememorigas ilin, ke la grupo ankoraŭ ekzistas. Gazeto estas ankaŭ bonega propagandilo. Por la propagando estas necese disponi pri faktoj kiuj estas bazataj je okazaĵoj, kaj de konvinkos. Ni devas kolekti tiujn faktojn kaj konigi ĝin. Finfine grupgazeto ankaŭ taŭgas por eduka laborado, kiu povas fariĝi tiel vasta kiel la financaj kaj teknikaj rimedoj de la grupo permesas.

Ĉi-tiu unua gazeto estas tre simpla kaj modesta. Estas nia deziro, fari taŭgan eldonon, kiun oni legos kaj disvastigos kun plezuro. En la estonto vi povos kunlabori, ensendante artikolojn, anekdotojn, poemojn k. t. p.

Karaj kamaradoj, estas eble faru ian bonegan de nia gazeto. Ĉu ni povas kalkuli je via helpo kaj kunlaboro ?

La redakcio.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA.

La mondpetskribo de U. S. A. : Pasinta jaro, la Universala Esperanto Asocio redaktis mondpetskribon al la Unuiĝintaj Nacioj por proponi la enkondukon de Esperanto dum la internaciaj kunvenoj de la U. N. O., en la instruado, la turismo, la internaciaj komerco kaj korespondado. La U. S. A. faris alvokon al ĉiuj esperantistoj kaj simpatiantoj por akiri kiel eble plej multe da individuaj - kaj grupsubskriboj.

Je la 4an de februaro 1949a la petskribo estis subskribita de ĉirkaŭ en la nomo de 14.500.000 personoj. El tiuj Germanio liveris preskaŭ 7.000.000, Japanio preskaŭ 5.000.000 Ĉeĥoslovakio kaj Nederlando, ĉiuj 1.000.000, Britio 700.000 kaj Norvegio 300.000

(El Franca Esperantisto)

U. S. A. : La tuta rezultaro de la Universala Esperanto Asocio sumiĝis je la fino de pasinta jaro 17.707 kontraŭ 16.004 je la fino de 1947a. Do plimultigo de 1.000 membroj.

(El Flandra Esperantisto)

La progreso de Esperanto : Esperanto jam estis enkondukata kiel ne devigata lernotemo por Reza Instruado en sekvantaj landoj : Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Grekio, Ameriko, Regiono de Germanio. En la sekvantaj landoj Esperanto estas instruata en multe da lernejoj, dum kaj post la ordinaraĵ lecionhoroj : Usono, Anglio, Francio, Svedio, Italio, Danlando. Pri la Sovjet-Unio neniam faktoj estas disponeblaj.

(El Flandra Esperantisto)

1 Germanio : La januaro - numero de la organo de la junulara sekcio de la Germana Esperanto Asocio sciigas : " Al ni atingis la informon, ke ek la jaro 1949a ĉiuj Esperanto-Asocioj denove estas malpermesata en la sekcio. Tiel decidiis tielnomita "okracia registaro".

Internaciaj somerkursoj : Kune kun la ordinara internacia kongresoj, ekzemple, kiuj okazis ĉi-tiu jaron en Bournemouth (Anglio) kaj Parizo; estas organizitaj internaciajn somerkursojn. Ekzemple en Helsingör (Svedio), Hâbernbâd (Svislando), Dosky (Ĉeĥoslovakio), Kerk-Avezaath apud Tiel kaj en Teylingerbosch (Vogelenzang)

Kanariaj Insuloj : En "La Laguna" okazis en la universitato esperantaj kursoj. Tio okazis dum 1946a-1947a kaj 1947a-1948a. La kursoj 1948a-1949a jam komencis, sed la nova rektoro malpermesis ĝinkauze de anonima artikolo en la falanga gazeto "Ariba Espana". La Kanariaj Insuloj estas hispanaj...

Aertrafiko : La K.L.M. kiu estas la unua aertrafika kompanio kiu uzis Esperanton, intencas reidendi la broŝuron : K.L.M.-historio. Kun S.A.S. estas interkonsentite pri diversspeca propagando en Esperanto. Jam, aperis faldprospekton.

(El Arbetar Esperantisten)

ANEKDOTOJ

La kuraĝulo

Juĝ isto : Kiu kuraĝas fari bruon dum la traktado, tiun oni forigos el la ĉambrego?

Akuzito : Hura! Hura!

Akra respondo

-Se mi iam edziĝos, mi prenos nur tian virinon, kiu estas la tuta male de mi.

-Amiko, tio ne estas malfacila. Nun malfacila. Nuntempe ekzistas ja tiel multe da inteligentaj knabinoj!!

Sensenca demando

-Kiuj viroj estas la plej bonaj edzoj, ĉu la saĝaj aŭ la malsaĝaj?

-Ĉu-tiu demando ne estas respondebla.

-Kial?

-La saĝaj viroj ne edziĝas!!

EL NIA SEKCIO

La 1an de Oktobro je la 7 h. okazos nia mitulvespero en nia sidejo "De Hertog" Herenthalsebaan, 251. La esperantistoj kaj familianoj estas invitataj ĉeesti la festeton.

Novaj Kursoj : La 7an de Oktobro je la 8a komencos nia nova kurso por komencantoj en nia sidejo.

Ni ankaŭ sukcesas organizi kursojn en Hilrijk, edegem kaj Kapellân.

ENIGMOJ

Kun l. mi estas parte de la korpo.

Kun p. per fumi oni uzas min.

Kun v. instigon donas al ĉevalon.

Kun ŝ. sur akvo oni vidas min.

Kiu pano estas trinkebla?

Kiu turo malaltiĝas kaj malaltiĝas?

Kiu kolo vekas en la printempo? en la arbore?

Kiu payo flores en la ĝardeno kaj sur la kampo?

Kiu vingo estas bonodora?

Ensendu viajn artikolojn al Kdo. R. Fontijn, Van Dornestraat, 3 Deurne



ESPERANTE

Gazeto de la Laborista Esperantista Grupo "Antauen"
Sektejo Deurno

NI INTER POPOLOJ LA MURONJN DETRUOS

Sekretario :
J. Bonte

Nº 2
Oktobro 1949a

Redaktoro :
R. Fontijn

oo

Al nia Grupo,
Kaj jen, karaj gekamaradoj, la duan numeron de nia gazeto! Ni iras antaŭen, ĉu ne? Ni posedas jam malgrandan presejon; ĝi estas tre malmoderna, sed, kun multe da fervoro kaj kuraĝo ni klopodas fari ion post ion pli bone. Ni esperas ke, en la estonto ankaŭ vi volos kunlabori per ensendaĵoj. Ne timu! Vi povas fari simplon artikolon! Kial ne? Vi ja sekvis la kurson, ĉu ne? Do estu laborema! Ensendu artikolon kaj la redaktoro kaj la presisto zorgos ke ĝi aperos en la sekvonta eldono.

Bedaŭrinde, estas ĉiam la samaj membroj kiuj laboras por la Grupo aŭ per Esperanto. Ĉi-tiujn membrojn mi dankas treege; ekzemple pro ilia kunlabore al la florprocesio, dum kiu ni faris belegan propagandon; ankaŭ pro ilia kunlabore al la nitulfesto kaj alispecaj aferoj. Mi povas diri ke nia propagando estis sukcesplena, vidu la kursojn en Wilrijk, Kapellen, Edegen kaj ankaŭ nian propran kurson.

Certe, la Grupo "Antauen" el Deurno iras antaŭen, kvankam ĝi estas malriĉa, malriĉa de mono. Sed ĝi estas riĉa, tre riĉa de fervoraj propagandistoj!

Finfine, mi volas diri ion al la membroj, kiuj sekvis la kurson dum la pasinta vintro. Parolu esperantlingve, gekamaradoj! Ĉiam estas eble! Vi povas! Certe, vi ĉiuj povas paroli! Estas nur la kuraĝo kaj la kutimo kiuj mankas, sed vere, ili venos, kredis mi! Legu la librojn de nia biblioteko, estas tre malmultekosta kaj ni posedas librojn pri ĉiaspecaj tenoj. Tielmaniere, vi estos baldaŭ veraj esperantistoj.

Kune kun "ESPERANTE" iru antaŭen!!
Vivu ESPERANTO, Vivu "ANTAUEN"!!

F. Matheysen
Vice-prezidanto

.....
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro
atingos la celon en gloro.
L. L. Zamenhof
.....

TRA LA MONDO ESPERANTISTE

Danke al la agrabla pereso de la poŝtestro, la poŝtistoj de la ĉefpoŝtoficejo Antverpeno I, faris malgrandan sed tamen interesan ekspozicion en la manĝejo de la poŝtoficejo de la 23a de Septembro ĝis la 7a de Oktobro.

Oni faris tion por atentigi al la poŝtistoj la utilecon de Esperanto en la poŝtservoj.

De la 6a ĝis la 13a de Aŭgusto 1949a okazis la 34a Kongreso de U.E.A. en Bournemouth (Anglio). 1600 gesarideanoj el 30 landoj ĉeestis

La Finlanda Asocio de Fervojspersonaro, kiu ekzistas el 1500 membroj decidis akcepti Esperanton en sia asocia instruo. Simile decidis la Finlanda Ligo por Laboristklerigado.

En diversaj Japanaj sciencaj kaj teknikaj fakgazetoj, revuoj kaj lernolibroj aperas nuntempe artikoloj Esperantlingvaj.

En la Laborista Universitato en Visdalen (Svedio) okazis internacia kurso, al kiu partoprenis Esperantistoj el 8 diversaj landoj. Ĉi-tiu kurso estis organizita de la Sveda Esperanto-Instituto kaj subvenciita de la Svedaj korporacioj.

La Asocio de Esperantistoj de la Germana Fervojspersonaro proponis la revigon de Esperanto al la tuta fervojspersonaro. La ĝenerala Direktoro de la Germana fervojoj simpatias kun ĉi-tiun proponon.

Kiam kunlaboros la Flandraj Laboristaj Esperantistaj Grupoj?
Kiam ili fondos la Asocio de Flandraj Laboristaj Esperantistoj?

KURIOZAJOJ (el la Mondo Tribuno)

Ĉe Cash en Suddakota (Usono) estis trovita ŝtoniĝinta arbotrunko 2,7m. diametra. La trunko etendiĝas ĉirkaŭ 25 metrojn el la tero kaj reprezentas la plej grandan ŝtoniĝintaĵon tiuspecan, kiun oni ĝis nun trovis. La ŝtoniĝinta trunko estas la lasta restaĵo de arbaro, kiu kovris tiun teron antaŭ proksimume 60 milionoj da jaroj.

Antaŭ ne longe farita nombrado rezultigis, ke la angla insulo estas ĉirkaŭita de zono (aro) da 5177 malgrandaj insuloj.

La plej alta arbo estas eŭkalipto en Aŭstralio. Ĝi atingis la imponan altecon de 153 metroj kaj troviĝas en nacia parko de Sidney.

Kartludo en Ĉikago

-Mi havas tri asojn!
-Mi havas du revolverojn!
-Vi gajnis! (el Praktiko)

FABELO EL ETIOPO

La leono, la hienco kaj la ŝakalo iun nokton kune ĉasis. Matene, kiam ili revenis, ili kune portis la ĉasaĵon: bovinon, azenon kaj kaprinon.

La leono parolis: Kiel dividi la kaptitaĵon? Via Leona Moŝto, respondis la hienco, estas facile dividi ĉi okaze. Vi mem prenu la bovinon, mi la azenon kaj la ŝakalo ricevu la kaprinon.

La hienco, tre kontenta pri sia saĝo, etendis plenan apolon; sed la leono per forta piedbato mortigis la hienon.

Kion opinias vi? la leono demandis al la ŝakalo; Nur eldiru kuraĝe vian opinion.

Via Leona Moŝto, respondis la ŝakalo, ne estas dubo pri kiel dividi. Vi mem prenu ĉiujn tri bestojn: la bovinon per matenmanĝo, la azenon per tagmanĝo kaj la kaprinon per vespermanĝo.

Tio estas saĝa parolo, respondis la leono. Sed diru al mi, kiu instruis al vi tiom da saĝo?

La piedbato, per kiu vi mortigis la hienon! (Sennaciulo)

Kiu per siaj pensoj kaj agoj koscie celas akiri monon de mondĉivitano, tiu nekoscie, pli malpli rapide, akiras ecojn de homo.

(E. Lanti)

Kamarado, Kamaradino,

Kion vi jam faris por la progreso de nia Ideo?

Anekdoto

Ŝi: Al mi plaĉas, kiam viroj kun nigraj haroj surhavas nigrajn vestaĵojn kaj brunharaj viroj brunajn vestaĵojn.

Li: Kaj kiajn vestaĵojn devas surhavi senharaj viroj?

(el la Mondo Tribuno)

KANTO DE L' LIGO (de V.A.Mozart)

1. Fratoj, manon donu kore
Kaj senzorge, sendelore
Belan horon festu ni!

2. Al la Dio kantu gloron:
La spiriton kaj la koron
Kial donis la ciel'?

3. Homoj en la oriento,
Homoj en la okcidento,
En la sud' kaj en la nord'!

(L. L. Zamenhof)

Ĉeestu regule la kunvenojn!

Pagu regule la kotizon!

EL NIA SEKCIO

Havebla ĉe nia Libro-Servo :

- La Komencanto (lernolibro) 25,00 Fr.
Vertareto Schiöler's 42,50 Fr.
Poŝvortareto F.L.E. 10,00 Fr.
La Verda Koro, romaneto 30,00 Fr.
Kovertoj kun grupinsigno 10,00 Fr. po 50 pecoj
Insigno (verda stelo) 17,50 Fr.
Tek bildkartoj (Bruselo) Esperantlingvaj 5,00 Fr.
Tek bildkartoj (Kortriko) Esperantlingvaj 7,00 Fr.
Leterpapero kun grupinsigno 37,50 Fr. po 50 pecoj

Mendu ĉe : Kio. A. Falen; Lanebruggestraat, 2 Deurno-Antverpeno

ENIGMOJ

Solvej de la enigmoj, kiuj aperis en la unua numero:

- 1. lipo pipe vipo ŝipo
2. ĉarpiano aventuro kukelo papavo seringo

Nº 3

Nº 4

Kun e. ni estas bona varo
Kun e. ne multe oni ŝatis min
Kun i. ni kreskas en arbore
Kun u. ni sekvas post la krin'

Kun ĉ. ni estas ia vesto
Kun k. ni estas korpa parto
Kun p. ni estas ekleziano
Kun v. ni kreskas en la tero
Kun s. ni servas por purigo

SCIIGO DE LA REDAKCIO

Al ĉiu, kiu volas ensendi artikolojn, Subskribu viajn ensendaĵojn
kaj menciù la devenon de la artikoloj kaj vian adreson!
Ni nur akceptos artikolojn kun subskribo.

Ni petas al nia legataro, sendu al ni informojn pri la okazaĵojn
en la Esperantomovado.

La Redakcĉadreso estas: R. Fontijn; Van Dornestraat, 3
Deurno-Antverpeno

Cek sendu, fidu kaj laboru konstante
Al ni estas la estonto!

oooooooooooooooooooooooooooooooo



ESPERANTE

Gazeto de la Laborista Esperantista Grupo "Antaŭen"
Sekcio Deurne

NI INTER POPOLOJ LA MUROJN DETRUOS

Sekretario:
J. Bonte

Nº 3
Novembro 1949a

Redaktoro:
R. Fontijn

oo

LA PACOIDEO

.....
Tiam, kiam D^e Zamenhof kreis Esperanton, li klopodis duoblan celon. Unue, detruu la lingvajn murojn en la mondo kaj due, progresigi la amon, kunlaboron kaj toleremon inter la homoj kaj popoloj. Nuntempe, post tiom da jaroj, ni konstatas ke Esperanto ja malrapide sed konstante progresadas. Iom post iom la Esperantomovado plivastiĝas. Sed koncerne la dua parto de la Zamenhofs celo, ni ne povas diri la saman. La homaro estas dividita pro naciaj, rasaj kaj opiniaj diferencoj, kiuj formas altajn murojn de malamo, netoleremo kaj malpaco inter la homoj kaj popoloj. Ĉi-tiuj muroj estas pli fortaj ol la lingvaj muroj kaj ili dividas eĉ la Esperantomovadon en diversaj tendencoj, malgraŭ la interna ideo de Esperanto. Tia situacio estas bedaŭrinda sed komprenebla. El tio ni konkludas ke la progreso de Esperanto ne donas garantion por la progresigo de la pacoideo.

Ni, Esperantistoj, klopodas la tutmondan efektivigon de Esperanto, kiel unu lingvo por ĉiuj. Ni nomas nin Internaciistoj aŭ Mondcivitanoj. Do, ni devas ankaŭ klopodi la efektivigon de Unu Mondo por ĉiuj. Eble tio ne estas la tasko de la Esperantomovado. Sed, tiel same kiel D^e Zamenhof kreis Esperanton por transpontigi la lingvajn murojn kaj fondis movadon por propagandi sian ideon, ni povas ankaŭ serĉi rimedon por transpontigi la naciajn, rasajn kaj opiniajn murojn. Samtempe ni povas fondi movadon por propagandi la ideojn de solidareco, kunlaboro kaj toleremo inter la homoj kaj popoloj, aŭ unuvorte : la pacoideon. Ĉi-tiu Pacomovado devas esti neŭtrala, universala kaj uzi Esperanton. Ĝia fundamenta ideo devas esti:

1. Ĉiuj homoj kaj ĉiuj popoloj havas egalajn rajtojn.
2. Ĉiaj opinioj havas egalajn rajtojn.
3. Nenia distingo kaj nenia disputo inter homoj aŭ popoloj pravigas perforton.
4. Sekve, ni malaprobas: la militon, la turmenton, la subpremon kaj la sklavecon.
5. La internacia solidareco estos nur eble kiam ekzistos
Unu mondo por ĉiuj.
Unu paco por ĉiuj.
Unu lingvo por ĉiuj.

Kd? R. Fontijn

Bilate ĉi-tiun artikolon ni rememorigas la Esperantistaron, ke D^e Zamenhof publikigis en 1915 sian "Leteron al diplomatio" en kiu li proponis al diplomatatoj starigi la sekvantajn leĝojn sub internacia garantio:

1. Ĉiu regno apartenas morale kaj materiale al ĉiuj siaj naturaj kaj naturigitaj loĝantoj, kian ajn lingvon, religion aŭ supozatan devenon ili havas; neniu gento en la regno devas havi pli grandajn aŭ pli malgrandajn rajtojn aŭ devojn ol la aliaj gentoj.

2. Ĉiu regnaro havas plenan rajton uzi tiun lingvon aŭ dialekton, kiun li volas, kaj konfesi tiun religion, kiun li volas. Nur en la institucioj publikaj, kiuj ne estas destinitaj speciale por unu gento, devas esti uzata tiu lingvo, kiu per komuna interkonsento de la regnancj estas akceptita kiel lingvo regna.

3. Pro ĉiuj maljustaĵoj, farataj en ia regno, la registaro de tiu regno estas responde antaŭ konstanta Tut-Eŭropa Tribunalo starigita per interkonsento de ĉiuj Eŭropaj regnoj.

4. Ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti ne la nomon de ia gento, sed nur nomon neŭtrale-geografian, akceptitan per komuna interkonsento de ĉiuj regnoj.

.....
Ĉiu homo havas tri karakterojn;
tiun, kiun li montras;
tiun, kiun li kredas, havi, kaj
tiun, kiun li havas.
.....

UNIVERSALA DEKLARACIO DE HOM-RAJTOJ

.....
(Parto el la Deklaracio akceptita kaj proklamita de la ĝenerala Kunveno de la Unuigitaj Nacioj, 10 decembro 1948.)

Artikolo 1

Ĉiuj homoj naskiĝas liberaj kaj egalaj je digneco kaj rajtoj. Ili estas dotitaj per inteligento kaj konscienco kaj devas kondukti reciproke en la spirito de frateco.

Artikolo 2

- 1. Ĉiu homo sen distingo de raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politikaj aŭ aliaj opinioj, nacia aŭ socia origino, posedaĵo, naskiĝo aŭ alia kvalito, devas posedi ĉiujn rajtojn kaj liberecojn proklamitajn en ĉi-tiu Deklaracio.
- 2. Neniu distingo devas esti farata rilate al la politika, leĝa aŭ internacia stato de la lando aŭ teritorio, al kiu iu persono apartenas, tute egale ĉu la teritorio estas sendependa, sub kuratoreco, nemanĝo, aŭ sub iu alia limigo de sia suvereneco.

Artikolo 3

Ĉiu homo havas rajton je vivo, libereco kaj persona sekureco.

Artikolo 4

Neniu devas esti tenata en sklaveco aŭ servuto; la sklaveco kaj la sklavkomerco devas esti malpermesataj en ĉiu formo.

Artikolo 5

Neniu devas esti torturata aŭ punata kruele, nehumane aŭ degrade.

Artikolo 6

Ĉiu homo havas la rajton esti leĝe rekonata kiel persono.

(El: American Esperanto Magazine sept.-okt. 1949a)

.....
Gesamsideanoj, laboru por interhoma fratiĝo
.....
anekdotoj
- - - - -

En la lernejo

Instruisto: Karlo, diru al mi la
verbon "ocedi" en la estonta
tempo!
Lernanto: Dormi!

Liaj laborhoroj

-Mi refoje devas iri al mia
banko.
-Nu, do iru nun!
-Ne, nun tie ne estas farebla,
nun ĝi estas ankoraŭ malfermita!

.....
La estonto estas al tiuj, kiuj akiras ĝin
.....



ESPERANTE

Gazeto de la Laborista Esperantista Grupo "Antaŭen"
Sekcio Deurne

NI INTER POPOLOJ LA MUROJN DE TRUOS

Sekretario :
J. Bonte

№ 4

Decembro 1949a

Redaktoro :
R. Fontijn

oo

15an de decembro: ZAMENHOFA TAGO

.....
Antaŭ 90 jaroj, la 15an de decembro 1859a naskiĝis en Bjelostok (Polio) L.L. Zamenhof. Lia patro, Markus Zamenhof, estis instruisto de la modernaj lingvoj kaj geografio.

La loĝantaro de Bjelostok ekzistas el kvar diversaj elementoj: Rusoj, Poloj, Germanoj kaj Hebreoj. Ĉiu gento parolas ĝian propran lingvon, sekve de tio ne komprenas unu la alian. Kia malordo! Tia situacio faris fortan impreson en la senteman karakteron de la juna Zamenhof. Jam dum sia infanjaroj li pripensis la eblecon de komuna lingvo, uzebla por ĉiaj popoloj. De tiam ĉi-tiu ideo regis lian tutan vivon.

En la Gimnazio, Zamenhof faris unuan projekton de lingvo internacia nomita "Lingve Uniuersale". Dum la jaro 1878, sidante en la lasta klaso, li konigis ĝin al kelkaj kolegoj. Ses aŭ sep inter ili konvinkiĝis. Ĉi-tiuj ellernis la projekton. En junio 1879 finiĝis gimnazia kurso. La amikaro de la "Lingve Uniuersale" disiris. Post kelkaj provoj por plivastigo la Zamenhofan ideon, ili perdis la kuragon kaj forlasis Zamenhof kiu restis sole kun sia idealo. Provizore li kaŝis sian laboron, timante la mokon kaj la persekuton de la homoj.

Dum sia 5½jara restado en la Moskva Universitato li laboris silente. Ĉi-tiu tempo estis tre malĝoja por li. La sekreto de lia ideo turmentis lin. Li apartigis sin, faris poemojn, i.a. "Mia Penso" kaj perfektigis sian internacian lingvon.

Post multeda malfacilaĵoj, Zamenhof povis eldoni en julio 1887 sian unuan broŝuron rusingvan. Li sendis ekzemplerojn de tiu broŝuro al la ĵurnaloj, soietoj, profesoroj kaj kuracistoj. Baldaŭ sekvis tradukaĵoj Pola-, Franca-kaj Germanalingvaj. Lia projekto havis ĉiemonde grandan sukceson. En 1889 formiĝis Esperantoklubo en Nurnberg (Germanio). En la sama jaro, la American Philosophical Society en Philadelphia akceptis Esperanton kiel lingvo internacia. La 1an de septembro 1889 aperis la unua numero de "La Esperantisto", gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto, eldonita de Chr. Schmidt, prezidanto de la Esperantoklubo en Nurnberg, kaj kun kunlaboro de Dro. Zamenhof.

La Internacia Esperantomovado evoluis konstante kaj la 5an de aŭgusto 1905a okazis la unua tutmonda kongreso en Boulogne s/m. Proksimume 700 partoprenantoj el 30 diversaj landoj ĉeestis.

Dro. Zamenhof laboris fervore por sia ideo. Li dediĉis sian tutan vivon al Esperanto. Sed, jam de lia junuljaroj li estis kormalsana. Tiu malsano plimalboniĝis grade. En 1917, la 14an de aprilo, Zamenhof mortis. En tago pluva, malhela, malvarma, oni portis la ĉerkon al tombejo, nur akompanita de Varsoviaj Esperantistoj, Germana ŝipestro kaj la amaso popola. Pro la milito la landlimoj restis fermitaj al la alialandaj esperantistoj.

Honori ni ĉiam ĉi-tiun homon, kiu, inspirita de lia nobla koro, per lia genio kreis potencon fundamenton por la internacia amikeco kaj la paco. Laboru ni senĉese por plivastigi lian ideon.

La Redakcio

Mia Penso

Sur la kampo, for de l' mondo, antaŭ nokto de somero
Amikino en la rondo kantas kanton pri l' espero.
Kaj pri vivo detruita ŝi rakontas kompatante -
Mia vundo refrapita min doloras resangante.

"Ĉu vi dormas? Ho, sinjoro, kial tia senmoveco?
Ha, kredeble rememoro el la kara infaneco?"
Kion diri? Ne ploranta povis esti parolado
Kun fraŭlino ripozanta post somera promenado!

Mia penso kaj turmento, kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento al vi iris jam oferoj!
Kion havis mi plej karan - la junecon - mi ploranta!
- Metis mem sur la altaron de la deo ordonanta! -
- Fajron sentas mi intere, vivi ankau mi deziras; -
Io pelas min eterne, se mi al gajuloj iras . . .
Se ne lpaças al la sorto mia peno kaj laboro,
Venu tuj al mi la morto, en espero - sen doloro!

Anekdoto

..... - Do, vi parolis kun via patro. Kaj kion li diris?
- Li ĝojas, ke vi estas poeto.
- Ĉu li komprenas iom pri poezio? demandis la feliĉa amanto
- Ne, eĉ ne atomon, sed mia antaŭa amiko, kiun li volis ĵeti
tra la pordego, estis boksisto!

Kuriozaĵoj

..... La plej peza viro de la mondo mortis en Stamford en Lin-
colnshire en Anglujo. Li nomiĝis Daniel Lambert, pezis 320 kilogramojn
kaj havis korpan periferion de 3,45 metroj.
Laŭ amerika statistiko vivas sur la mondo kvaroble pli vi-
raj balbutuloj ol virinaj balbutulinoj.
En Genua naskis la sinjorino Laŭrella Perpa en la tago de
sia 38a naskiĝtago la 22an infanon. (El Monda Tribuno)

Pri Logiko

..... La floroj de la trifolio estas fruktigataj de la birdoj, kiu
transigas la polenon de unu floro sur la alian. Se oni do deziras multe
da trifolio, multaj burdoj estas necesaj.
Rezultas do: Ju pli da birdoj, des pli da trifolio.
Bedaŭrinde la birdoj ne povas plimultiĝi laŭ deziro, ĉar la
kampmusoj persekutas kaj mortigas ilin.
Rezultas do: Ju pli da kampmusoj, des malpli da birdoj, des malpli da
trifolio.
Ankaŭ la kampmusoj ne povas plimultiĝi senlime, ĉar iliaj
malamikoj estas la katoj, kiu persekutas kaj mortigas ilin.
Rezultas do: Ju pli da katoj, des malpli da kampmusoj, des pli da birdoj,
des pli da trifolio.

(El Liberiga Stelo)

En Dolero

.....
Mi ludas la harpon
La karan al mi,
Kaj melodiojn mi vekas el ĝi!
Elvenas la tonoj,
Elflugas la sonoj,
Esprimas doloron . . .
Pacigas la koron!

Marie Hankel --1908

Anekdoto

..... - Vi ankoraŭ rememoros tiun belegan horloĝon, kiu mi perdis
antaŭ kvin aŭ ses jaroj.
- Jes.
- Nu, hieraŭ mi prenis mian malnovan veston, kiun mi ne plu por-
tis dum longa tempo, kaj kion vi pensas ke mi trovis en ĝi?
- Kompreneble vian horloĝon!
- Ne, mi trovis la truon, tra kiu mi ĝin perdis!

21. La unua ŝtato, kiu enkondukis oficialan instruadon de Esperanto en lernejoj, estis la usona ŝtato Maryland (1908).

22. La unua internacia korespondado inter infanoj okazis en 1903. Ĝin iniciatis la moravia instruisto ĉejka en Bystrice-Hostyn kaj la svisa instruisto Ducommun en Le Locle.

23. La unuan poŝtmarkon kun Esperanta teksto eldonis en 1925 la Sovjet-Unia poŝto. Ĝi estas eldonata je la honoro de la rusa radio-scienulo Popov. Sur la marko estas la Esperantlingva surskribo: Inventisto de radio Popov.

.....
NI RIDU

.....
-Patro, mi povas fari ion, kion vi ne povas!
-Kion?
-Kreski!

-Filineto mia, se Harold petos vian manon, diru al li, ke li parolu kun mi.
-Kaj se li ne petos?
-Tiam diru al li, ke mi volas paroli kun li.

.....
TRA LA MONDO ESPERANTISTA

.....
La Nederlanda Ministro por Instruado deklaris, ke li aprobas la enkondukon de Esperanto tuj kiam sufiĉe da instruistoj estos disponeblaj.

La gazeto "Svenska Esperanto Tidningen" de Stokholmo, sciigis ke oni instruas Esperanton en la publikaj lernejoj en Berlino.

La Departemento pri Publika Informado de U.N.O. petis al la Esperanto-Asocio de Norda-Ameriko (E.A.N.A.) sendi al ĝi ekzemplerojn de la Esperanto-traduko de la Univerŝala Deklaracio de Hom-Rajtoj por tutmonda disvastigo. E.A.N.A. jam sendis tiujn ekzemplerojn.

La Aŭstria revuo de la Naturamiko (Mitteilungen), tre vaste legata organo, enhavas regulan Esperanto-rubrikon.

La Esperantista Poŝt- kaj Telegraf-oficista Unuiĝo dum autuno aranĝos plurajn kursojn, kiuj okazas en la domo de la ĝenerala direkcio de Poŝto kaj Telegrafo, Wien.

La direktoro de la Germana Poŝto, centra administracio okcidenta en Frankfurt a.M., rekomendas la lernadon de Esperanto alla poŝtistoj kaj opinias, ke la lernejoj unuavice devas instrui la fundamenton de la lingvo.

La slovakaj oficejoj por informado kaj klerigo en Bratislava eldonas en kelkaj lingvoj-inkluzive de Esperanto-ĉiumonatan informbuletanon Kultura Revuo, kiun oni volonte sendas senpage al petantoj. Ĝi informas pri slovakaj kulturvivo kaj aktualaĵoj. Skribu al : Povernictvo informacii a osvety, Bratislava, ĉeĥoslovakio.

.....
Nia laboro kaj pacienco
La mondon faros feliĉa!

L.L. Zamenhof

.....
DE LA AFRIKA SUNO, SABLO KAJ VENTEGO (de Paul Thomas - Germanio)

.....
Unu el miaj plej ardaĵoj deziroj kiel knabo estis vojaĝo al Afriko. Entuziasme mi legis la libron de la angla ĵurnalisto kaj esplorvojaĝanto Henry Morton Stanley, kiu rakontis, kiel li serĉis la malaperintan esploranton Livingstone, trapasante la "plej malhelan Afrikon".

Pli poste mi tiam vidis en muzeo partojn de la ekipaĵo de diversaj esplorvojaĝantoj, kaj kun estimo kaj respekto mi rigardis tiujn memoraĵojn. Sed la jaroj forpasis kaj mi forĝesis la dezirrevon de mia juneco, neniam pensante, ke mi iam vidus la "nigran kontinenton".

Komencis la malfeliĉa mondmilito kaj mi estiĝis soldato. Kiam la milito fine finis, mi veturis al Afriko : ne kiel kuraĝa esploranto, sed kiel mallibera militkaptito! Do kvankam mi ne estis libera vojaĝanto, mi tamen malfermegis miajn okulojn, ĉar mi volis vidi ĉion eblan.

En PORT SAID apud la SUEZ-KANALO mi tuŝis la afrikan teron, kaj miregante mi ekvidis la multajn grandajn ŝipojn en la haveno. La negrojn mi rigardis tiel scivoleme, kiel ili rigardis nin. Mi vere iom ektimiĝis, kiam granda rikananta negro kun belaj blankaj dentoj

prenis lian dentaron el la buŝo kaj enŝovis ĝin en lian poŝon. "Tio do estas Afriko!" mi pensis.

Per la vagonaro ni veturis laŭlonge de la SUEZ-KANALO. Mi estis iomete seniluziigita, ĉar mi ĉiam imagis, ke tiu mondkonata martrafikstrato estus pli impresanta. Unue la kanalo fluas tra verdaj kampoj kaj paŝtejoj, kaj inter vilaĝoj de argildometoj. Kvazaŭ en ĵugo mi ekvidis laborantajn kamparanojn, paŝtigantajn kamelojn, preĝantajn mahometanojn, virojn kaj virinojn, rajdante sur azenoj, kaj multajn knabojn kaj knabinojn, kiuj almozpetis, kiam nia trajno en iu stacio aŭ survoje haltis. Kelkfoje ili provis, fari etajn komercojn kun ni aŭ ŝteli de ni. Mi ankaŭ vidis multajn malgrandajn kanalojn por la malsekigado de la kampoj; mi vidis akvoradojn, kiuj altĉerpis la akvon kaj kiuj estis tiritaj de aznoj aŭ de bovoj, kaj same mi vidis bovojn pelitajn en cirkloj sur la tranĉita greno por draŝi ĝin. Ĉio, precipe la felaĵaj virinoj kaj knabinoj, portante la akvokruĉon sur la kapo, estis en la sama antikva maniero, kiun ni scias el la historio, kaj kiel ni ankoraŭ povas legi en la biblio.

Iom post iom la verdaj kampoj, la sukoplenaj paŝtejoj, la graciaj palmoj kaj aliaj arbaroj, ĉio ĉesigis kaj la dezerto komenciĝis. Ambaŭflanke de nia trajno disvastiĝis montetoj, sablaj dunoj, ĝis la senfineco de la horizonto. La okuloj nur ekvidis sablon, rugflavan sablon!

Ho, kio estas tio? Ni ekvidis la nekredeblon: realan ŝipon en la sabla dezerto!! Sed baldaŭ ni trovis la klarigon: la SUEZ-KANALO fluas malantaŭ la dunoj kaj granda ŝipo trapasis ĝin, kaj de la ŝipo ni nur vidis la suprajn partojn.

Kelkfoje, kiam la dezerto estis ebena, malproksime brilegis sekigitaj blankaj lagoj de salo. Homojn ni nur vidis, kiam nia trajno malofte haltis je malgranda dezertstacidomo, sed ĉiam ni nur povis observi virojn aŭ infanojn. La arabaj virinoj ja estis kaŝitaj, tamen kelkfoje ni ekvidis senforman amason de nigraj drapoj kaj vestaĵoj, en kiuj ni povis supozi virinon.

Post longa, malrapida veturado ni atingis la "Maldolĉan Lagon", kiun la SUEZ-KANALO trafluas inter PORT SAID kaj la RUĜA MARO. En la ĉirkaŭaĵo de la lago estis kelkaj tendaroj por militkaptitoj, kie ankaŭ mi devis resti preskaŭ unu jaron. De tiu tempo mi nur volas diri ke la klimato estis tre, tre varma, ĉar la najbara RUĜA MARO ja apartenas al la plej varmegaj regionoj de nia tero. Ofte estis tiel varmega, ke ni ne povis iri nudpiede tra la sablo, por ne bruli niajn piedojn. Bedaŭrinde ni ne ricevis sufiĉe da akvo, kaj nesufiĉan manĝon, kaj pro tio ni tute ne fartis bone.

La nordafrikan vintron ni konatiĝis en EL DABA, kio estas la nomo de araba vilaĝo ĉe la libia-egipta limo, kie troviĝis tri grandaj tendaroj por militkaptitoj.

(daŭrigota)

.....

POR KOMENCANTOJ

.....

De nia k-do E. Spitaels ni ricevis afablan proponon. Li ensendis artikolon por komencantoj kaj volas daŭrigi. Ni tre dankas k-do Spitaels kaj ni volonte akceptas lian kunlaboron.

- - - - -

Esperanto estas tre facila lingvo. Simpla laboristo povas kompreni. Profesoroj instruas al la studentoj en la universitatoj la malpacilan Latinan lingvon. Laboristoj instruas al laboristoj la internacian lingvon Esperanto. Per Esperanto laboristoj el Belgio korespondas kun laboristoj el multaj landoj de Eŭropo, Ameriko, Azio, Afriko kaj Oceanio. Laboristoj de Okcidenta Eŭropo interesas al laboristoj de Orienta Eŭropo. Brazilio kaj Japanio estas interesaj landoj por ni, belgoj. Longa estas la distanco, sed Esperanto helpas. Esperantisto serĉas adreson en Esperantogazeto, prenas plumon kaj skribas poŝtkarton aŭ mallongan leteron. Simpla teksto zorgas por facila kompreno. Korespondado kostas malmultaj frankoj. Komencantoj rapide trovas amikojn, kamaradojn en la tuta mondo.

Ekzemplo de simpla letero:

Samideano,

En anonco, publikigita en la revuo

"Internacia Kulturo" de decembro 1949, vi demandis korespondadon kun kamaradoj el la tuta mondo. Mi tre volas ŝanĝi lete-



ESPERANTE

Gazeto de la Laborista Esperantista Grupo "Antaŭen"
Sekcio Deurne

NI INTER POPOLOJ LA MUROJN DETRUCS

Nº 6

Februaro 1950a

Prezo: 2 Fr.

Jarabono: 20 Fr.

.....

EL LA HISTORIO DE LA MONDLINGVO

.....
Jam de la plej malnovaj tempoj la homoj ĉiam sentis, ke estas malferliĉa afero havi en la mondo diversajn lingvojn. Ankaŭ la Biblio diras, ke la diverseco de la lingvoj estas puno de Dio. Kaj la antikvaj poetoj? kantante pri la feliĉa "ora epoko" ĉiam diras, ke dum tiu epoko la tuta homaro havis unu lingvon.

En la malnovaj tempoj kleraj homoj revis jam pri universala lingvo kaj en la pli novaj epokoj grandaj filozofoj, kiel ekz-e Bacon, Comenius, Descartes, Leibniz, klopodis verki sistemojn de universala lingvo aŭ universala skribo.

Ni konas entute 311 projektojn de mondlingvo, faritajn ĝis 1929.

La projektoj estas diversaj: 1) Bildskriboj kaj cifera lingvoj; 2) Lingvoj tute eltrovitaj; 3) Lingvoj faritaj sur la bazo de la naciaj lingvoj.

Al la unua grupo apartenas tiuj projektoj, kiuj ne proponis veran lingvon paroleblan, sed nur skribon similan al la ĉina skribo, kie ĉiu vorto havas apartan bildon aŭ signon. Tiujn signojn ĉiu popolo legus en sia propra lingvo. Same kiel hodiaŭ la samajn arabajn ciferojn 1, 2, 3, k. t. p. ĉiu popolo legas alimaniere en sia propra lingvo. Ekzistas tiaj projektoj, en kiuj ĉiu vorto havas numeron kaj specialajn vortarojn por diversaj lingvoj montras la signifon. Tiel ekzemple se mi trovas en mia vortlibro, ke la cifero 1 signifas: "la", 21 = blanka, 22 = nigra, 143 = mangas, 527 = kato kaj 863 = lakto, tiam mi facile komprenas la frazon: "1, 22, 527, 143, 21, 863".

Al la dua grupo apartenas paroleblaj lingvoj, kies vortoj ne similas al la vortoj de la naturaj lingvoj, sed la aŭtoro arbitre faris ilin per la kombinado de la literoj. Ni montras ĉi tie la plej interesan lingvon de tiu grupo: SOLRESOL, kies aŭtoro estis la franco J. Sudre (1787-1862).

La bazo de la lingvo SOLRESOL estas la nomoj de la muziknotoj: do, re mi, fa, sol, la, si. Ĉiuj vortoj estas kunmetitaj el ĉi tiuj sep silaboj. Jen kelkaj ekzemploj:

si = jes	dore = mi	redo = mia
do = ne	domi = vi	remi = via
re = kaj	dofa = li	refa = lia
doremi = tago	domisol = Dio	
dorefa = serajno	solrido = diablo	
doresol = monato	sollasi = supreniri	
dorela = jaro	silasol = malsupreniri	

La lingvo SOLRESOL estis tre malperfekta kaj tute ne taŭga por uzo, ed ĝia ideo estis tre interesa kaj sprita. Ĉar la vortojn de SOLRESOL oni povas ne nur skribi kaj elparoli, sed ankaŭ kanti aŭ fajfi aŭ per muzik-instrumento ludi. Plue oni povas la vortojn skribi sur liniojn kiel muziknotojn aŭ anstataŭi ilin per ciferoj, ekz-e doresol = 125. Oni povas esprimi la vortojn ankaŭ per sep diversaj koloroj kaj mansignoj. SOLRESOL havis entute 11.732 vortojn (7 unu-silabojn, 49 du-, 336 tri-, 2268 kvar-kaj 9072 kvin-silabojn).

Ĉar la eltrovitaj lingvoj estis tro neperfekta kaj iliaj vortoj preskaŭ ne teneblaj en la memoro, oni komencis kompreni, ke la internacia lingvo devas esti simila al la ekzistantaj kaj uzataj lingvoj. Laŭ tiu principo oni faris la lingvojn de la tria grupo (ekz-e: Langue bleue, Latino sine flexione, Langue nouvelle, Novilatin, Pasilingua Idiom neutral, Esperanto k. a.).

Inter la dua kaj tria grupoj kiel miksaĵo staras la lingvo VOLAPUK, la plej konata kaj sukcesa lingvo antaŭ Esperanto. ĝia aŭtoro estis la katolika pastro J.M.Schleyer (1831-1912). La vorto VOLAPUK venas el la angla lingvo (World = mondo kaj Speak = lingvo). La gramatiko de VOLAPUK estis tre simpla kaj facila, kaj ankaŭ vortojn oni facile faris per sufiksoj. Sed ĝi ne estis sufiĉe natura. Ekzemple la nomoj de la mondpartoj en VOLAPUK: Yulop = Eŭropo, Silop = Azio, Fikop = Afriko, Melop = Ameriko kaj Talop = Aŭstralio. En ĉi tiuj vortoj la lasta silabo "op" estas la sufikso de la mondpartoj. La unua silabo estas prenita el la originala vorto. En VOLAPUK ne ekzistas la litero "r", ĉar la ĉinoj ne povas ĝin facile elparoli. Anstataŭ "r" estas ĉiam "l". Tial Ameriko estas ne Merop, sed Melop.

Jen la teksto de la preĝo "Patro nia" en la lingvo VOLAPUK:

"O Fat obas, kel binol in süls, paisaludomöz nem ola! Kömonöd monargän ola! Jenomöz vil olik, äs in sü, i su tal! Bodi obsik vädeliki givolös obes adelo! E pardolös obes debis obsik, äs id obs aipardobs debeles obas. E no obis nindukolös in tentadi; sod aidalivolös obis de bad. Jenosöd!"

Post la malsukceso de VOLAPUK aperis la lingvo ESPERANTO, kiel idealala mondlingvo en komparo kun ĉiuj aliaj projektoj. Post ESPERANTO oni faris ankoraŭ kelkajn mondlingvajn sistemojn (ekz-e IDC, INTERLINGUA, OCCIDENTAL, NOVIAL), sed la praktiko montras, ke per ESPERANTO la mondlingva problemo por nia epoko estas solvita.

(El Praktiko)

.....

NI RIDU

.....

Du amikoj sin renkontis:

- Kaj, Pietro, kion vi faras?
- Mi estas vendisto de aŭtomobiloj.
- Ah! kaj...tio iras?
- Mi ne devas plendi; mi jam vendis la mia!

Inter amikoj:

- Mia edzino ĉiunokte songas, ke ŝi estas edzino de milionulo, -plendas la unua.
- Estu feliĉa, -respondas la alia; mia edzino pensas tion dum la tuta tago.

.....

TRA LA MONDO

.....

El Nederlando:

La astronomia observatorio en Utrecht sendas al la eksterlandanoj, kiuj intencas viziti la observatorion, speciale por tiu celo presitan karton kun skizo pri la situo de la observatorio kaj informoj en la lingvoj angla kaj Esperanto.

La popoluniversitato de la urbo Haarlem en la programo de sia vintra kursaro malfermis ankaŭ kurson de la lingvo Esperanto.

En la urbo Dordrecht la urbestro enkondukis la instruadon de Esperanto en la Komunuma Lernejo n-ro 17. Ĉiusemajne unuhoran Esperanto-lecionon ricevas ĉi tie 42 infanoj. Simile en la urbo Zwijndrecht 12 infanoj lernas Esperanton en la Komunuma Lernejo.

El Belgio

La Urba Servo por Turismo de la historia flandra urbo Brugge ĵus eldonis en la lingvo Esperanto ilustritan faldprospekton pri la urbo sub la titolo: "Brugge, la artjuvelo de Belgujo" - (La prospekto estas senpage ricevebla ĉe: Urba Servo por Turismo, Dijver 16, Brugge, Belgio)

El Aŭstrio

Okaze de la nunjara Aŭstria Esperanto-Kongreso, kiu kunsidis en la universitata urbo Graz, ĉefurbo de Stirio, dum la 16-20 de Julio, la urbestro de Graz decidis doni al unu placo de la urbo la nomon "Esperanto-placo". La solena inaŭguro de la nomo okazis la 18an de Julio, en la kadro de la kongresa programo.

La Stiria Landa Fremdultrafika Oficejo en Graz aranĝos en la printempo de 1950 internacian ekspozicion de afiŝoj kaj fotoj kun

Esperanto-sekcio.

El Brazilio

La ilustrita kultura revuo "Brasilitas", eldonata en la urbo Bauru (ŝtato S. Paulo), komencis publikigi specialan Esperanto-paĝon kun tekstoj pri kaj en Esperanto.

El Egipto

En la Amerika Universitato en la ĉefurbo Kajro, post diskuto pri la urga bezono de universala lingvo pro la atendata kreo de mondŝtato. Esperanto estis aprokata kiel internacia lingvo kaj oni komencis ĝian instruadon.

El Portugalio

La Portugala registaro malpermesis la Esperanto-movado en Portugalio.

El Usono

En la urbcentro de Detroit dum la monato Decembro staris grandega afiŝo sur la supro de 8-etaĝa konstruaĵo, lumigata vespere per multaj elektraĵoj, kaj videbla el ĉiuj ĉefstratoj ĝis distanco de duon-kilometro. La literoj estis unu metron altaj. La teksto estis: "Gaja Kristnasko".

.....

DE LA AFRIKO SUNO, SABLO KAJ VENTEGO (daŭrigo)

Vere ne estis plezuro por ni, kiam la pluvado de la vintro superakvis nian tendaron, kaj iam dum la nokto ni subite devis konstati, ke ni kuŝis en la akvo. La vintra temperaturo de Afriko ŝajnis al ni sufiĉe malvarma, kvankam ĝi neniam falis sub nul grado. Alia malbona memoro al EL DABA estas la senĉesaj sabloventegoj. Pro tio ni tre ĝojigis, kiam ni transloĝigis al la malgranda havenurbo TOBRUK en la antaŭa Itala kolonio LIBIO en la norda Afriko. TOBRUK estas situata ĉe la MEDITERANEA MARO kaj la aliaj tri flankoj de la urbo estas ĉirkaŭataj de la dezerto. La Libia dezerto konsistas el multaj ŝtonoj, rokoj kaj sablo. Nur dum la pluva sezono oni povas trovi malmultajn etajn kreskaĵojn. Terkulturo tute ne estas ebla. Sed malgraŭ tio mi tamen vidis sufiĉe grandajn arojn da kaproj kaj ŝafoj, kiuj dum la vintro vivis de la malabundaj herbetoj sen ricevi akvon por trinki. Pro tio mi demandis la arabajn paŝtistojn, ĉar mi ja sciis, ke en la tuta regiono ne ekzistis akvo. Ĉiu akvo por trinki kaj lavi devis esti transportita tien per akvoŝipoj.

Dum la pasinta milito TOBRUK kaj ĝia tuta ĉirkaŭaĵo kelkfoje estis batalkampoj, kaj pro tio ĉie en la dezerto estis disĵetitaj tankoj detruitaj, aŭtomobiloj, kanonoj kaj alia militekipaĵo.

Tre grandan danĝeron por homoj kaj paŝtigantaj ŝafoj signifis la minoj, kiuj ankoraŭ nombre kuŝis en la dezerto. Poste la germanaj militkaptitoj devis forigi ilin. Araba paŝtisto rakontis min, ke li perdis 12 el siaj 120 ŝafoj per minoj. Antaŭ la milito la arabo vojaĝis tiamaniere, ke li rajdis sur la azeno kaj sia edzino sekvis lin. Hodiaŭ la arabo lasas iri antaŭe kaj unue sian edzinon, portante la pakadon, kaj poste li sekvas ŝin en sekura distanco, ĉar li volas eviti por si mem la danĝerojn de la minoj.

Jes, la arabaj virinoj estas ĉapitro aparta. La araboj nur povas edziĝi, se ili kapablas aĉeti virinon. Sed la plej multaj araboj neniam havas sufiĉe da mono por aĉeti brunan belulinon kun vualo, kaj pro tio ili devas resti fraŭloj dum la tuta vivo.

Ĝis nun mi ne jam sciigis, kiel kaj ŝiritaj tendoj, sed mi tute ne scias, de kie ili prenas la akvon, ĉar fontoj ja ne ekzistas. La araboj estis plej ofte tre afablaj kaj preskaŭ ĉiam ili salutis min: "Sajida!", t.e. "Estu salutita!". Sed ankaŭ preskaŭ ĉiam ili intencis fari kun mi malgrandajn negocojn. Se ili ne sukcesis, sia ĉiama respondo estis: "Ma'aliŝ!", t.e. "Faras nenion!".

Ofte mi demandis min, kiel la araboj en iliaj mizeraj tendoj povis travivi la sabloventegojn, kiu blovegas preskaŭ ĉiujn semajnojn. Tiam la aero estis plenumita de sablo, tiom da sablo, ke oni ne povis

vidi kaj preskaŭ ne spiri. La polvo de la dezerto enpenetris okulojn orelojn, nazon kaj buŝon, kaj la suno ne estis videbla. Tiamtempe ni ĉiam diris: "La dezerto migras!". Dum la ventegoj oni ofte povis observi trombojn, kiuj turnigadis alten en la ĉielon. Tiukaze ni devis firmteni per nia tuta forto la ŝnurojn, per kiuj niaj tendoj estis fiksitaj, por ke la tromboj ne forportu la tendojn. Sed feliĉe plej ofte estis belega vetero. Dum la tuta jaro, ankaŭ dum la vintraj monatoj ni banis kaj naĝis en la MEDITERANEA MARO. La akvo havis preskaŭ ĉiam belegan bluankoloron. Sed ni devis esti singardemaj, ĉar en la akvo estis ŝarkoj. Ili estis observitaj ofte en la proksimeco de la marbordo, kaj neniu volis renkonto tiujn manĝegemajn rabfiŝojn.

Belaj estis la Afrikaj noktoj, kiam oni aŭdis la arabojn mallalte kaj malproksime blovantajn la flutojn kaj ilian monotonan kantadon. Ĉiuj steloj estis klare videblaj ĝis la horizonto, ĉar neniam estis nebulo. Kaj mian lastan rigardon mi ĉiam dediĉis al la nordstelo, kiu estis la peranto de miaj sopirantaj pensoj al mia hejmlando kaj al mia forlasita kaj soleca edzino.

(Ensendaĵo de Paul Thomas - Germanio)

.....

KELKAJ KONSILOJ AL NOVAJ ESPERANTISTOJ

.....

1. Aĉetu bonan GRAMATIKON, en kiu estas klarigoj pri ĉiu parto de nia lingvo.

2. Aĉetu bonan VORTARON. Ĝi estos via ĉiutaga helpanto. La plej utilaj estas la nur-Esperantaj vortaroj, kiuj ĉiun vorton klarigas per Esperanto mem.

3. LEGU MULTE! LEGU ĈIUTAGE! Rigardu la reklamojn en la Esperantaj gazetoj; elektu la plej taŭgajn librojn kaj aĉetu ilin. Antaŭ ĉio legu la verkojn de D-ro Zamenhof.

4. Legante tenu en la mano krajonon kaj substreku tiujn vortojn kaj esprimojn, kiuj al vi estas novaj kaj malfacilaj. Post kelkaj semajnoj aŭ monatoj denove trarigardu la saman libron kaj kontrolu, ĉu vi forgesis tiujn substrekitajn vortojn.

5. Abonu Esperantajn gazetojn, inter ili almenaŭ unu internacian gazeton, kaj ilin diligente legu.

6. SKRIBU MULTE! La plej efika kaj agrabla maniero estas: korespondi kun alilandaj Esperantist(in)oj. Adresojn vi trovas en la gazetoj. Se vi mem metas vian adreson en gazeton, memoru, ke via devo estas respondi almenaŭ unufoje al ĉiu, kiu al vi skribis.

7. TRADUKU TEKSTOJN, sed ne en la komenco. Unue legu multajn librojn de diversnaciaj aŭtoroj, precipe originalajn. Tradukante atentu: neniam traduku vorton, sed ĉiam frazon, penson, ideon. Memoru, ke la Esperanta teksto devas havi internacian stilon. Tial ne uzu tiajn esprimojn, kiujn povas kompreni nur viaj samnacionoj. La internacian stilon vi trovas en la bonaj Esperantaj verkoj. Post la tradukado vi povas fari utilan kontrolon, retradukante la tekston.

8. TRADUKU ARTIKOLOJN el via nacilingva ĵurnalo. Per tio vi lertigas en la esprimado de la aktualaj aferoj.

9. Uzu ĉiun okazon por paroli Esperante. Vizitu diligente la kunvenojn de la Esperanta societo en via urbo kaj partoprenu aktive en ĝia vivo (debatoj, societaj ludoj, ekskursoj k. t. p.)

10. Serĉu la okazojn por aŭdi la lingvon el la buŝo de bonaj Esperantistoj. Vizitu kongresojn kaj klopodu en ili esti ĉiam en aliancia societo.

11. Se vi ne havas okazon paroli kun aliaj personoj Esperante, parolu hejme kun vi mem aŭ legu laŭte bonajn tekstojn.

12. Skribu en via privata notlibreto viajn notojn en Esperanto. Tiamaniere vi ellernos la esprimadon de la ĉiutagaj aferoj. Multaj Esperantistoj estas mallertaj en tio, ĉar ili neniam ekzercis.

13. Klopodu ellerni la kalkuladon en Esperanto. Faru ofte ekzercon en tio.

14. Tre bona ekzerco estas lerni parkere poemojn kaj ofte deklami ĝin. Per la poemo vi lernas bonan akcenton kaj elegantajn esprimojn.

15. Tre bona praktiko estas kanti Esperante, ĉar tio helpas plej multe akiri bonan akcentadon.

16. Portu ĉiam la VERDAN STELON, por ke aliaj samideanoj rekonu vin kaj vi havu okazon uzi nian lingvon.

.....

Redakteja adreso: FONTIJN RENE - Van Dornestr. 3 ; Deurne (Antwerpen BELGIO)



ESPERANTE

Gazeto de la Laborista Esperantista Grupo " Antaŭen " Sekcio Deurne.

NI INTER POPOLOJ LA MUROJN DETRUOS

Nº 7
Marto 1950a

Prezo 2 Fr.
Jarabono 20 Fr.

PAROLAS PATRINO .

Tiun ĉi rakontaĵon ni rekomendas al ĉiuj militinstigantoj.)

Mi rakontas al vi, sinjoro, ĉi tiun rakontaĵon, ĉar vi okupas vin pri verkado kaj ankaŭ ĉar mi opinias, ke estas urĝa tempo, ke ĝi estu aŭdata de pli vasta rondo, ol en mia eterna izoleco. Via tasko estas formi miajn nelertajn vortojn tiamaniere, kiel oni kutimas formi ilin en la belliteraturo. Kaj mi petas vin, donu al la vortoj ĉiun forton kaj ekscitiĝon kaj la tutan malĝojon kaj avertadon, kian oni povas atingi en skribita rakontaĵo. Ĝi estas vere necesa, ĉar poste la homoj eble tamen ekkredos tion, kion mi rakontos.

Mi loĝas en lua domo kiel tute nekonata virino kaj nenion interesan oni trovas sur mi. Preskaŭ neniu konas min. Du fenestroj de mia ĉambro estas frunte al sensuna strato kaj post iliaj kurtenoj mi observas la murojn de la kontraŭaj domoj. Ne estas necese, ke mi havu pli belan vidaĵon el la fenestroj, mi ja tamen rigardas sole en la pasintecon. Unu - dufoje tage la homoj de mia hejmo renkontas min, kiam mi vagas kun mia nigra aĉetujo ekstrenen, de kie mi baldaŭ revenadas. Mi iras malrapide, mia koro estas malsana kaj tre malfacile mi spiras.

Neniam vi rimarkis, kiom multe da forlasitaj virinoj simile vagas ekstere kaj neniu ilin atentis? La vivo ĉirkaŭ ili ne por ili ekzistas, la montrofenestroj por ili ne brilas, neniu atendas ilin kaj ili tamen vivas, kvazaŭ rando de ĉiuj okazaĵoj, kvazaŭ iliaj ombroj. Kaj tamen ĉio kio okazas ĉirkaŭ ili tuŝas ilin, same kiel tiujn, kiuj la vivon trinkas plenuŝe. Sed post ili ekzistas io tre peza, ia granda doloro, pri kiu jam neniu ion scias, certe ia perdita vivo, pri kiu oni jam ne parolas.

Tiu maljuna sinjorino el la teretaĝo - oni diras pri mi - iras aĉetadi. Sed unufoje la domservistino ekrigardis la daton de mia naskiĝtago kaj ŝi klakfrapis la manojn: - Vi ja estas ankoraŭ tute juna virino! Tion faras viaj blankaj haroj.

Tion faras multaj aferoj, sinjorino. Kaj juna mi jam ne estas. Mi ofte pensas, ke mi havas jam mil jarojn.

Kaj ŝi ekridis, sed samtempe ŝi rigardis tiom necerte kaj malgaje, kvazaŭ ŝi volus bedaŭri min. Sed pro kio bedaŭri? Mia vivo ne estis ĉiam tia, kia ĝi estas. Ĝi estis ja iam tre bela. Ni vivis bone, mi kaj mia edzo, ni vivis feliĉe, kiam al ni naskiĝis infano.

Cetere vi vidas, ke tiu ĉi rakontaĵo estas neniel interesa, ĉu ne vere, tiajn travivaĵojn vivas tamen miloj da homoj. Kaj mi preskaŭ timas, ke vi rifuzos mian rakontaĵon kaj vi ne skribos plu rakontadon tiom ordinaran. Mi petas vin, estu iomote pacienca ankoraŭ.

Venis la milito. Tio nature ankaŭ estas nenio interesa, ni ĉiuj tion travivis kaj vere ni ĉiuj tre bone scias, kia ĝi estis. Sed fakte ĉu ne ŝajnas al vi, ke ne sufiĉas nur tiom facilanime diri: milito? Ĝi estas nur vorto, nur kelkaj silaboj, kiuj tute ne esprimas, kiom da teruro estas en tiu ĉi vorto kaŝita. Ĝi vere ne estas bona vorto, mi pensas, ĝi estas tro mola: tiu ĉi vorto devus knari, metalbrui, dolori, malodori per pulvo, per sekiĝinta sango kaj tamen ĝi estus ja nenio kontraŭ la realeco. En tiu milito mia edzo batalis. Ne kun armilo en la manoj, tio estis ĉe ni ne ebla, oni kaptis lin, kondamnis kaj ekzekutis pro la partopreno en rezista movado.

(el Esperanto-Servo)

(daŭrigota)

NIAJ EKSTERLANDAJ KORESPONDANTOJ SKRIBAS.

.....
Internaciaj Feri-Semajnoj

kun Somera Universitato

Kufstein, 19-an ĝis 30-a de julio 1950a

- 1) La propagandon por la I.F.S. transprenis Aŭstria Esperantista Federacio, landestraro Tirolo, kunlaborante kun la E-Centro.
- 2) La aliĝojn oni bonvolu sendi al : Verkehrsbüro (Trafikoficejo) Kufstein, Tirolo, Aŭstrio. Datlimo de la aliĝoj : 15-a de majo 1950. Se kelkaj partoprenantoj el la sama E-grupo aŭ el la sama loko sin anoncas, komuna aliĝo sur listo estas petata.
- 3) La tranoktadon prizorgos la trafikoficejo Kufstein en hoteloj kaj privataj domoj. Laŭ neceso ankaŭ eblas gastigado en la ĉirkaŭaj lokoj Ebbs, Kirchbichl kaj Langkampfen, de kie oni povas veturi per aŭtobusoj al Kufstein.
- 4) La provizoraj prezoj estas 1 lito.... 6 - 10 ŝil.aŭstr.,
1 matenmanĝo... 3 ŝil., 1 tagmanĝo.... 6 ŝil.
1 vespermanĝo.. 6 ŝil. (Sango laŭ prezaltiĝo aŭ malaltiĝo rezervata.)
- 5) La Somera Universitato okazos en la gimnazio de Kufstein.
La programon starigas la landligestraro de Tirolo.
- 6) Rondvojaĝoj per aŭtobusoj : "ĉirkaŭ la Kajzer-monto (Kaiser)"
"Innsbruck kaj Hafelekar", "Ehrwald kun Cugšpic-monto (Zugspitze)", "Grosglokner-montaro (Grossglokner)" kaj kelkaj aliaj tut- aŭ duontagaj ekskursoj je prezo de 13 - 71 ŝil. (Hodiaŭaj prezoj.)
- 7) Ceteraj aranĝoj : Ekskursoj al la lagoj de la ĉirkaŭo, en la mondkonatan valon de Kajzer (Kaisertal), publikaj koncertoj, orgenkonzertoj sur la plej granda orgeno subĉiela en Eŭropo, Tirola vespero, dancaranĝoj ktp., dimanĉaj diservoj kun E-predikoj ktp.

HANS STEINER -landligestro de A.E.F. - Tirolo
.....

Henrik LARSEN , Aalborg-Danio , nin skribas :

Karaj gekamaradoj,

Mia koresponda amiko, Frans Matheyssen, petis min skribi kelkajn vortojn al via kluba gazeto, kaj tio mi kompreneble kun granda ĝojo faros.

La dana Esperanto-movado bedaŭrinde ne estas tiom granda, kiom ni deziras ĝin estas, sed la movado kreskas. Unu el la kaŭzoj de tiu kreskado estas la du grandaj kongresoj de S A T (Kopenhago 1939 kaj Aarhus 1947)

Mia loka klubo dum multaj jaroj estis eĉ tre malriĉa kaj ankaŭ tre malgranda, kaj mi kaj miaj kamaradoj ofte parolas pri via klubo kaj via granda laboro kaj via sukceso, kiu ni do ne envias al vi.

Mi deziras al vi, ke via klubo kaj via landa organizo kreskegos.

Mi kredas, ke via klubo ege kreskos, ĉar ĝi estas iniciatema, speciale la redaktoro estas iniciatema, ĉar li en la gazeto n° 1 (septembro 1949) translokis Helsingor al Svedio ! La urbo fakte situas en Danio (la insulo Sjælland), sed mi pardonas al li, ĉar la distanco inter Helsingor kaj Svedio nur estas treege malgranda, kaj Svedio estas nia frata lando.

Mi salutas vin kaj deziras al vi ĉio bona en la estonteco.
Via dana kamarado,

Henrik Larsen

.....

LA "SANKTA PAULO" PREĜEJO en Antverpeno

.....
En Antverpeno nenia preĝejo estas pli rimarkinda ol la "Sankta Paŭlo" post la "Katedralo" kaj la "Sankta Jakobo" preĝejoj.

La ordeno de la Dominikanoj konstruigis, en la XIIIa jarcento, monaĥejon, preĝejon kaj universitaton. Pli poste la lasta transloĝis al "Lovenjo". La konstruaĵoj estis en roma stilo. Tre ofte subakvigis la preĝejo, kaŭze de tro alta alfluo de la "Skeld'akvo, ĉar en tiu tempo la riverego estis ne ankoraŭ endigata. Pro tio la monaĥoj forrompis la preĝejon en la XVa jarcento. Ili plialtigis la terenon kaj rekonstruigis la nunan preĝejon, en gotika stilo. La fulmo detruis la antaŭfasadon en la XVIIIa jarcento. Poste ĝi estis rekonstruata en la sama stilo.

Starante en la korto de la monaĥejo, oni rimarkas tuj la diferencon inter la diversaj stiloj.

Interne -- la altaroj de la krucnavo, en la preĝejo, estas regataj per la paneloj "La Sankta Sakramento" pentrita de "Rubens" tuj post sia reveno el Italio, kaj la "Sep Kompatemaj Laboroj" de Teniers la maljuna. La super ĉefaltara panelo montriĝas "la krucdepreno" de Cels, kaj pli supre staras statuo de "Sankta Paŭlo", skulptita de Verbruggen. En la norda krucnavo pendas sur la muro panelo "La flagelado de Kristo" de Rubens, (1617); kaj super la altaro bela pentrita kopio de "Caravaggio" "La virgulino donante rozarion al sankta Dominilo". (La originala panelo estis aĉetita de kelkaj artpentristoj inter kiuj Rubens kaj Breugel, speciale por la preĝejo; sed sin trovas nun en la muzeo de "Vieno"). Je la kontraŭa flanko staras statuo de sankta Rozo, kontraŭ kolono de la ĉefnavo.

Belega el ligno skulptita murkovraĵo, proksimume 2 metrojn alta kaj 120 metrojn longa, ĉirkaŭas la internan preĝejon. La konfesejoj estas ornamitaj ambaŭ flanke per homgrandaj bildoj el ligno, kiuj reprezentas anĝeloj, sanktuloj kaj apostoloj. "Quellin" komencis tiun skulptadon, kaj liaj filoj finis la laboron, kiu daŭris 40 jarojn. En la suda krucnavo sab la panelo "La sep kompatemaj laboroj", staras konfesejo, kiu estas montrata kiel propramana laboro de Quellin.

Sur la norda muro pendas paneloj de ĉiuj jam konataj artpentristoj de tiu tempo. Tiel ili ĉiuj alportis ion por la plibeligon de la preĝejo.

En la tuta Eŭropo oni ne trovas egalan orgenon al tiu de la preĝejo. Estas vere ke kelkaj malaltaj tonoj el la ludilego ne plu funkcias, sed la preĝeja estraro hezitas ripari ilin, pro timo ke la nunaj laboristoj malfunkciigos la tutan orgenon.

La flanko de la koridoro, en la angulo de la "Zwartzusterstraat" estas tute pavimita per grandaj tombŝtonoj. Tra pordego en ĝia dekstra flanko oni alvenas en korto (ĝardeno), kiu estas malnova tombejo. En la fundo, alta kalvario, konstruita en 1709a, flankas sur la muro de la preĝejo. Oni atingas ĝin per ŝtona vojeto, flankata per homgrandaj bildoj el ŝtono skulptitaj.

La tuto estas imitaĵo de la Anĝela Ponto de Romo.

La vojeto kondukas al mistera kavaĵo, en kiu sin trovas imitata tombejo de Kristo, kaj flanke de ĝi, infero en kiu bruligas malbenuloj. Super la kavaĵo, sur diversaj etaĝoj, montriĝas, el ŝtonoj skulptitaj bildoj, scenoj el la pasio de Kristo, kaj tre alte sur la muro pendas la krucigita Kristo.

Estas rimarkinde ke la pli granda nombro de altaroj en malnovaj preĝejoj estas konstruitaj en baroka stilo. Sed kaŭze de la religia malordo dum la XVIa jarcento, la malnovaj altaroj el ligno skulptitaj, kaj kiuj estis ankoraŭ veraj artaĵoj, estis detruitaj aŭ bruligitaj. Bedaŭrinde, ĉu ne?

Vere la preĝejo "Sankta Paŭlo" estas vera perlo de la Antverpena artkonstruado-pentrado kaj skulptado.

Viktoro Van Hove,

.....

NI RIDU

.....
Demandis la instruisto : Kiel oni nomas homon kiu ĉiam nur parolas, tutegale ĉu tio jes aŭ ne interesas la aŭskultantojn ?
Respondis Joĉjo : Mi dirus ke tio estas instruisto.

LA VORTO : - Elizabeto, unu vorton de vi, kaj vi faros min feliĉa !
- Frenezulo !

La Fiŝkaptisto kaj la Esperantistino.

Frue dum la mateno, dimanĉo kaj bela vetero, fiŝkaptisto sidis sur ŝtono ĉe malgranda rivero. La akvo estis freŝa kaj klara. La fiŝkaptisto sidiĝis kaj atendis. Li atendis jam longe, sed la fiŝoj ne venis al sia hoko. Jano havas multe da tempo. La okuloj de Jano vidas ne sole la senmova ruĝa floŝaĵo sur la akvo, sed ankaŭ la spegulbildon de la alia riverbordo kaj la blankajn nubojn en la blua aero.

Knabinan figuron li vidis promeni laŭ la bordo. Pli kaj pli proksime ŝi venis al Jano. Estas bela figuro; konstatis Jano kun plezuro. Ŝi haltis ĉe li.

"Bonan matenon", sonis gaje ŝia voĉo. "Ĉu la fiŝoj volas mordi, Jano?" "Ne unu fiŝon mi jam kaptis." Li ekstaris kaj salutis. Li konas Marion Ŝi loĝas ĉe sama strato. Ŝi estas fervora Esperantistino, li scias. Ili rigardas al la akvo. La ruĝa floŝaĵo restas senmove.

"Kian libron vi ĉehavas?" Jano havas intereson por libroj.

"La titolo estas "Fontamara". Belega libro. Vi devas legi ĝin! Ĝi estas tre interesa romano pri la faŝistoj en itala vilaĝo. Sed... vi ne kapablas kompreni, ĉar ĝi estas en Esperanto.

En ŝiaj okuloj estis rido kaj kompato.

Li ne respondis, rigardis al la akvo kun la senmova floŝaĵo.

"Lernu Esperanton", ŝi varme atakis lin. "Komencu lerni en nia grupo. Post malmulte da tempo vi komprenos."

"Ne, mi ne tre ŝatas lerni novan lingvon, mi pli ŝatas fiŝkapti. Sst jen fiŝo!"

"Imagu Jano, ke post unu jaro nur vi kapablos skribi al multaj landoj, legi librojn, paroli kun fremdaj personoj! Vi perdas vian tempon per fiŝkaptado."

"Sst, vidu la floŝaĵon. Hop! Ĝi nenion. La pano estas for, sed la fiŝo ankaŭ."

"Vi ne scias kiel facila estas Esperanto, ĉu ne? La gramatiko konsistas nur el kelkaj reguloj. Aŭskultu! Se vorto finiĝas per o, ĝi estas substantivo, se per a ĝi estas adjektivo, se per i... kaj ŝi longe parolis al li pri multaj facilaj de Esperanto." Sed, he! Kion vi faros? Si kun miro demandis, "kial vi metas ĉokoladon al via hoko? Fiŝoj ja ne ŝatas ĉokoladon! Ha, Ha!" Ŝi ridis laŭte.

"Ne ridu!" li diris serioze, "mi nur same faras kiel vi. Vi volas kapti min per Esperantogramatiko kaj mi ne ŝatas ĝin. Sed rakonti ion pri Fontamara. Ĉu estas ankoraŭ multaj bonaj romanoj en Esperanto?"

"Oh jes! Certe, estas "La fera Kalkanumo" de Jack London, "Petrolo" kaj "Jimi Higgins" de Upton Sinclair, "La Strato de la fiŝanta Kato" de Foldes, "Roza Luksemburg" de Henriette Roland Holst kaj... nu, mi donos tutan liston al vi."

"Dankon, estas tre interesa, eble... ni vidos..."

E. Spitaels

LA DIVERSAJ AĜOJ DE L'HOMO.

En supra ĉambro, lulo... lulo
Anĝele dormas la etlulo:

Et-aĝo.

Sed baldaŭ li el dorm' sin ŝiras
Kaj pri la bela mondo miras:

Mir-aĝo.

Jam ne plu side li tamburas,
Sed tra la dom' explore kuras:

Kur-aĝo.

Kun vundoj li (kaj sen rubandoj)
Revenas el stratubaj bandoj:

Band-aĝo.

Kaj baldaŭ sekvas li kun ĝojo
Knabino ĉien sur la vojo:

Voj-aĝo.

Al ŝi li donas sian nomon:
Por fondi kune novan domon:

dom-aĝo.

Li tiam estas tre utila,
Fortike viro, kvankam vila:

Vil-aĝo.

Kaj post rapida tempopaso
Postrestas nur senviva maso:

Mas-aĝo.

P. S.

Ni ne apliku al Virino
Ĉi tiun viv- kaj rimo-saĝon,
Ĉar de l'komenco ĝis la fino
Ŝi ĉiam havas saman aĝon:

Avantaĝo.

Redakteja adreso:

FONTIJN RENE - Van Dornestr. 3. Deurne (Antverpeno) Belgio